

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:

József Németh (red.)

Luiza Carol

Mireille Grosjean

Luigia Oberrauch Madella

Rob Moerbeek

Kunlaborantoj

de la aktuala numero:

Adjévi Adje

Aurora Bute

Guy Camy

Annie Grente

Mireille Grosjean

Jesper Jacobsen

Maurice Juy

Luigia Oberrauch Madella

Vicente Manzano-Arrondo

Rob Moerbeek

József Németh

Radojica Petrović

Sabiyumva Jérémié



ENHAVO

Enkonduko (Mireille GROSJEAN)	3
La 51-a ILEI-Kongreso en Madrido julie 2018 (M. GROSJEAN, A. GREENTE, V. MANZANO-ARRONDO, J. SABIYUMVA, A. ADJE, A. BUTE)	4
Niaj novaj estraranoj (Karine ARAKELJAN, JUNG Yuro „Unika”)	13
ILEI dum la UK en Lisbono (Mireille GROSJEAN).....	16
NITOBES-simpozio post la UK: grava evento por ILEI (Mireille GROSJEAN).....	17
6-jaraj instruistoj (kun traduko kaj komento de Mireille GROSJEAN).....	20
„Mi pequeña gramática de Esperanto” de Peter Weide (recenzo de V. MANZANO-ARRONDO).....	21
El la landoj kaj sekcioj (ES, HU, IT, NL)	21
Esperanto au Bac: agadraporto pri franca eksperimento (Guy CAMY, Maurice JUY, Jesper JACOBSEN)	27
Riparotaj/tradukotaj frazoj - Riparo de la riparotaj frazoj (Rob MOERBEEK)	29
ILEI kongresos en Serbio venontjare (kun aliĝilo) (Radojica PETROVIĆ).....	33
Informoj pri ILEI, redakciaj informoj	37

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Mireille GROSJEAN „Mirejo”, Grand-rue 9, cp 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando. <mirejo.mireille@gmail.com>. Tel. hejma (+41) 32 932 18 88, portebla (+41) 79 69 709 66. Rilatoj kun UNESKO kaj FIPLV. Observanto de ILEI ĉe UEA. Informado al ekstero.

Sekretario: Elena NADIKOVA, ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. fiksa: (+7) 8352-648531, portebla: (+7) 919-670-25-34. <lens_esperto@mail.ru>. Lerneja agado. Eo-centroj.

Estrarano pri financoj: William HARRIS „Vilĉjo”, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Tel. hejma (+ 510) 653 0998.

Estrarano: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. Tel. hejma (+381) 32 371053. <radojica.petrovic.rs@gmail.com>. Estrarano pri Kongreso de ILEI.

Estrarano: Ivan COLLING, DEPAC/UFPR, Ed. Dom Pedro I, Rua Gal. Carneiro, 560, Primeiro. Andar, Centro, BR-80060-150, Curitiba, PR, Brazilo. <iecolling@yahoo.com.br>. Universitata agado.

Estrarano: Karine ARAKELJAN, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio, Tel. poŝ.: (+374) 055-27-99-06. <karinko_arm@mail.ru>

Estrarano: JUNG Yuro „Unika”, 403, Grandmer, 2-4 Harigaya 2, Fujimi, Saitama JP-354-0017, Japanio. Tel. poŝ.: (+81) 70-5569-6771. <yurjun@st.amu.edu.pl>

Nota: La preciza taskodivido ene de la estraro ankoraŭ ne okazis.

Scienca Komitato

Prezidanto: Humphrey Tonkin,
Usono, University of Hartford;
AdE¹

Membroj:

Duncan Charters, Usono,
Principia College, Elsah

Renato Corsetti, Britio/Italio,
Università degli Studi di Roma
„La Sapienza”; AdE¹

Probal Dasgupta, Barato, LRU,
Indian Statistical Institute,
Kolkata; AdE¹

Aloyzas Gudavičius, Litovio,
Šiaulių universitetas

Boris Kolker, Usono; AdE¹

Ilona Koutny, Pollando/
Hungario, Uniwersytet im.
Adama Mickiewicza w
Poznaniu; AdE¹

Stefan MacGill, Nov-Zelando/
Hungario, vic-prez. de UEA

Aleksandr Melnikov, Rusio,
Академия Сельскохозяй-
ственного Машиностроения

Radojica Petrović, Serbio,
Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, MTA
Nyelvtudományi Intézet

¹ AdE – Akademio de
Esperanto

Sur la titolkovrilo: Jérémie
SABIYUMVA, okaze de la
Lingva Festivalo en la ILEI-
Kongreso, prezentis la kirundan
kaj la svahilan lingvojn.

Enkonduko

Karaj legantoj,

Du novaj sekcioj.

Du novaj estraranoj.

Du novaj Honoraj Membroj.

Du pliaj eventoj en julio 2018.

Sume ILEI vivas kaj pozitive evoluas. La Komitato de la Ligo povis akcepti novan sekcion en Senegalo kaj en Armenio.

Okazis elektoj ĉe ILEI. Aperas du novaj estraranoj: Karine Arakeljan el Armenio kaj Yuro Jung „Unika” el Koreio, junulino vivanta en Japanio. Bonvole legu la prezentajn tekstojn de ili du en tiu ĉi numero. Nun la estraro konsistas el kvar virinoj kaj tri viroj. La plena listo aperas en la retejo de ILEI: ilei.info/instancoj/estraro.php.

La Komitato elektis du eminentulojn donante al ili la titolon de Honora Membro. Temas pri Duncan Charters kaj Ronald Glossop, ambaŭ el Usono. Pri ili vi povas legi en la retejo de ILEI:

ilei.info/instancoj/honoraj_membroj.php.

La Kongreso de Hispana Esperanto-Federacio kaj universitata Simpozio staris ĉirkaŭ nia Kongreso kiel kadro ĉirkaŭ pentraĵo. Granda sukceso kaj rekordo estis nia julia Kongreso en Madrido, Hispanio, kun 230 partoprenantoj el 256 aliĝintoj. Tiu ĉi numero de IPR alportas al vi detalajn raportojn pri la hispanaj eventoj de tiu ĉi jaro, kaj aliajn informojn pri aktivajoj de niaj membroj. Ni deziras al vi agrablan kaj informriĉan legadon!

Mireille GROSJEAN
Prezidanto de ILEI

La 51-a ILEI-Kongreso en Madrido julie 2018

Ĉi tiu kongreso estis ne kutima, vere. Unue pro la fakto, ke ĝi ligiĝis al la tuthispana Kongreso de HEF, Hispana Esperanto-Federacio. Due ĉar ĝi finiĝis per brila dutaga simpozio ligita al la gastiganta universitato UNED, hispana universitato por neĉeesta instruado. Trie pro la alta nombro de aliĝintoj: 256.



Jen foto de la prezidantino de ILEI kun la esperantistaj profesoroj, kiuj organizis kaj gvidis la simpozion (de maldekstre): Nicolau Dols, Miguel Angel Gutiérrez Adúriz, Mireille Grosjean, Miguel Fernández, Manuel Pancorbo, Juan Diego Diaz Bautista, Vicente Manzano-Arrondo

ILEI

La Ligo vivas kaj progresas

de Mireille GROSJEAN, Prezidanto de ILEI (Svislando)

Jen prezento de la ĉefaj faktoj de nia 51-a Kongreso en Madrido.

Aliĝis 256 personoj. Tio estas rekordo por la ĉiujara grava evento de la Ligo. La Komitato elektis du novajn Honorajn Membrojn. Temas pri Profesoro Ronald GLOSSOP kaj Profesoro Duncan CHARTERS, ambaŭ el Usono.

La Komitato akceptis du novajn sekciojn: unu en Senegalo, unu en Armenio. Per tiu paŝo ILEI nun havas 43 sekciojn.

La Komitato dankis Profesorinon GONG Xiaofeng „Arko”, kiu deĵoris kiel vic-prezidanto en la Estraro dum 6 jaroj. La Komitato reelektis la kvin kandidatigantajn membrojn kaj alelektis du novajn personojn. Konsekvence la Estraro konsistas ekde nun por tri jaroj el (laŭ alfabeto ordo)

- Karine ARAKELJAN, Armenio, nova estraranino.
- Ivan COLLING, Brazilo
- Mireille GROSJEAN, Svislando, prezidanto
- William HARRIS, Usono, kasisto.
- Elena NADIKOVA, Rusio, sekretario
- Radojica PETROVIĆ, Serbio
- JUNG Yuro „Unika”, Koreio-Japanio, nova estraranino.



5 el la 7 estraranoj (Karine, Yuro, Elena, William, Mireille)

La taskodivido inter la estraranoj ankoraŭ ne okazis. Oni povas rimarki, ke la Estraro konsistas el kvar virinoj kaj tri viroj. Okaze de la tuta Kongreso kaj dum la konkluda parto la partoprenantoj povis esprimi sin, proponi novajn ideojn, diri dezirojn. La estraro multon notis kaj pritaksos tiujn sugestojn. Substrekindas, ke diversaj personoj ne nur proponis ion, sed ankaŭ proponis mem transpreni la taskon. Do la pozitiva etoso en la Ligo altiras kunlaboremulojn.

La Komitato aprobis ĉiujn raportojn kaj malŝarĝis la malnovan Estraron.

La Kongreso komenciĝis per du komunaj tagoj kun la tuthispana Kongreso de Hispana Esperanto-Federacio. Ĝi finiĝis per simpozio pri la kongresa temo: la kultura heredaĵo de Esperanto. Partoprenis en tiu simpozio diversaj esperantistaj profesoroj kaj unu profesorino de la Universitato por neĉeesta instruado UNED. Komprenoble la urbo Madrido, grava eŭropa ĉefurbo, altiris multajn partoprenantojn el entute 33 landoj, kiuj volis malkovri la kulturajn trezorojn de tiu urbego. Parkoj, muzeoj, preĝejoj, monumentoj ne mankas en Madrido. Ne eblas menciigi ĉiujn restoraciojn, kie la kongresanoj povis malkovri la hispanan gastronomion.

Inter la programeroj de tiu Kongreso oni povas menciigi la frandvesperon, kiu okazis ekstere kun koncerto de la grupo *Kaj Tiel Plu*; Lingvan Festivalon, AMO-seminaron, diversajn lingvokursojn, lertigadon de instruistoj EIT sub la gvidado de D-ino Katalin KOVÁTS, koncertojn de Kajto, nacian vesperon, internacian vesperon, dudekon da diversaj prelegoj kaj multajn interesajn ekskursojn.

Ni teame instruis al komencantoj!

de Annie GRENTE (Francio/Greklando)

Unua parto: organizo de la teamo

Kiam mi ricevis mesaĝon de Mirejo petanta organizon de la instruado al komencantoj fare de grupo da instruistoj, mi devis iomete pripensi. Mi jam estis preparinta teatraĵon, kiun mi intencis uzi por instrui al komencantoj, sed kiel sola instruisto. Kiel do organizi teamon?... Post iom da pripenso, mia konkludo estis, ke:

- jes oni bezonas ion por ligi la instruadon, ke ne estu individuaj kursoj kun la eblo, ke ĉiuj instruistoj elektos la saman instruobjekton, kiel ekzemple la akuzativon (kvankam kelkfoje oni bezonas ripeti la praktikon de la akuzativo pli ol dek fojojn, sed tio estas alia problemoj...);
- mi jam havis preparitan tekston (tiun teatraĵon), kiu entenis kelkajn interesajn lingvaĵojn;
- oni lernas per ripetado, do relegi teatraĵon kun diversaj celoj certe helpas lernadon;
- per teatraĵo la komencanta grupo havos ion por prezenti je la fino de la Kongreso.

Mi do kontaktis ĉiujn naŭ instruistojn sendante al ili la tekston de la teatraĵo kaj petante kunlaboradon surbaze de tiu teksto, sed ke ĉiuj elektu tion, kion ili volas instrui per tio/aldone al tio. Ni ankaŭ devis interkonsenti pri

kalendaro. Iom post iom tiel ni organizis la kurson. Ni finfine estis sep homoj, kiuj ellaboris tiun instruadon. Sep homoj el tri kontinentoj (Eŭropo, Afriko kaj Ameriko).

Dua parto: nia publiko

En la unua tago de la kurso mi konstatis kun plezuro, ke jes ni havis grupon (imagu teamon de sep instruistoj sen gelernantoj...)! Eĉ pli diversa geografie ol la instruistoj: homoj el Eŭropo (ĉefe Hispanio), Afriko, Azio (Nepalo, Ĉinio, Koreio)... 15 homoj (vd. *la internan kovrilpaĝon*). Preskaŭ ĉiuj estis komencintoj. Mi tamen devas konfesi ion...: tiu teatraĵo estas traduko, kiun mi estis farinta el la angla kaj mi prezentis ĝin en Esperanto kaj ankaŭ en la angla..., ke ĉiuj komprenu la ĝeneralan signifon. Mallely ĉeestis mian kurson kaj helpis, poste mi restis en la klasĉambro dum ŝia instruado.

La sekvantaj instruistoj estis Jérémie, Adriana, kun malpli da gelernantoj pro alia ero de la programo okazanta samtempe. Marion kaj Andrea elektis instrui kune dum du horoj. Ankaŭ Elinjo instruis dum du horoj, sed mi ĉeestis kaj iomete helpis. La lastan kurson (vendrede) mi faris, kiu fakte estis preparo de la posttagmeza prezento.

Konkludo: mi ĝuis havi eblon organizi kun aliaj. Ni ĉefe kunlaboris pri organizo. Eblus plibonigi la aferon, ekzemple petante, ke ĉiu instruisto skribu tion, kion li/ŝi instruis, kiuj estis la malfacilaĵoj. Tamen, la ĉefa celo estis, ke niaj komencantoj havu agrablan kontakton kun la lingvo, ke ili agu kune kaj, eĉ pli grave, ridu kune... Ĉu ne?

Mi neniam kontentas

de Vicente MANZANO-ARRONDO „Viko” (Hispanio)

Ĉu vi povas organizi la sekvantan ILEI-kongreson?

Mi legis tiun demandon meze de retmesaĝo. La teksto celis ne nur min sed pli ĉefe la lokan esperantistaron, ene de kiu mi kelkfoje partoprenis. „Ĉu organizi kongreson por ILEI? Ho! Kia honoro!” Tamen, la loka grupo rifuzis. Pro tio, la ĉefroluloj de la landa sekcio eklaboregis por realigi la kongreson, per malmulta tempo.

Esperantujo estas monda vilaĝo aŭ forumo¹, kie aperas ĉiu speco de homoj.

¹ Goro, Kimura (2016) La dialoga lingvo: „Forumo” kiel tria aspekto de Esperantujo. En Federico Gobbo (Ed.) *Lingua, politica, cultura. Serta gratulatoria in honorem Renato Corsetti* (pp. 157-165). New York: Mondial.

Unu el ili estas la Helpema Energia Respondecemulo Organizema kaj Obstina (HEROO), kiu suferas, se io ne estos farita kaj se iu ne estos prizorgita. HEROO nekredeble energie laboras dum sufiĉa kvanto da horoj ĝis la atingo de la celo. La organizado de kongresoj ofte eblas danke al tiu specio. Kompreneble la rezulto ne ĉiam estas tute bona. Permesu al mi iom korekti ĉi tiun lastan frazon: la rezulto estas kaj bona kaj malbona, dependas de la vidpunkto, ĉiam. Kaj ĉiam aperas alia esperantista specio: la nuancemulo, kiu kapablas trovi gravegan truon tie, kie la ceteraj vidas nur ebenan plankon. Plia alia specio: la feliĉa juĝisto. Tiu homo nek organizas nek akceptas respondecon nek spertas pri grava laboro. Ŝia/lia rolo estas juĝi la laboron de la aliaj, kiuj estas nekredeblaj mallertuloj laŭ ŝia/lia vidpunkto. Se tiu homo ne havas laboron kiel juĝisto, ŝi/li serĉas laboron kiel proponisto: estus bone ke sinjoro Oni faru tion aŭ tion alian².

Madrido, fino de julio de 2018. Tiu loko akceptis preskaŭ tri centojn da homoj, ĉefe esperantistojn sed ne nur, kiuj partoprenis en la Hispana + ILEI-kongreso aŭ la universitata simpozio, kiu okazis danke al la rilato kun la potenĉava universitato UNED (la monde plej granda eĉ ĉeesta el Hispanio). Mi estis unu el la multaj, kiuj vere ĝuis la sperton kaj multe lernis. Mi ne parolos pri la programo. Ĉiu el vi povas legi ĝin kaj opinii. Ĉiu povos demandi al homoj kiuj partoprenis kaj scii pri ŝia/lia opinio, tute ne reprezentanta por la ceteraj. Mi honeste publike diras, ke mi ĝuis kaj lernis, kaj mi gratulas la organizantojn. Sed ĉirkaŭ mi ĉiam estis homoj, kiuj sportis pere de plendoj preskaŭ pri ĉio. Lasu min kritiki ne la organizantojn, kiuj jam ricevis la normalan kutiman dozon, sed ĉiujn specojn de homoj, kiuj anstataŭ helpi aŭ kunlabori, preferas rigardi la mondon de malantaŭ sekura muro, sur komforta seĝo, ludante la rolon de profunde saĝa filozofo. Mi faros tion respekteme, pozitive, skeme:

1. Je la fino de la kongreso ĉiu kritiko senutilas. Gvidu la sekvantan kongreson danke al viaj rekomendoj aŭ konsiloj, kaj lasu en paco homojn, kiuj nur estas lacaj. Kie vi estis, kiam ili bezonis vin? Nun vi ja ne estas bezonata.
2. Se vi havas ideon, gratulon! Ĉiu dankos, ke vi alvenas kun via ideo ĉemane, tute preta kunlabori por realigi ĝin.
3. Se vi demandas al organizantoj ĉu vi rajtas publike kritiki ilin (ekzemple, humure), sciu, ke ili jesos, ĉar respektema homo ĉiam

² Spektu la videeton de Emilio Cid ĉe

<https://www.youtube.com/watch?v=URUFYXJknEI&t=133s>

akceptas kritikon. Tiu jeso etike ne rajtigas vin. Imagu ke ili neus. Kiel vi reagas?

4. Eĉ dum la sperto via helpo utilos. Se vi rimarkas mankon, proponu vin por kunhelpi. Eble tiu problemo ne bezonas iun, kiu rimarkigas „Atentu, kara! Okupiĝu pri tiu problemo!” sed iun, kiu diras „Mi rimarkis ĉi tion kaj mi pensas pri ĉi tiu solvo. Kiel mi povas labori por kunsolvi ĝin?”

Vere ĉiu Esperanta kunveno, renkontiĝo aŭ kongreso havas flankojn, kiuj meritas esti kritikataj. Kelkfoje ni, la homaj homoj, ne nur ne estas perfektaj sed eĉ tute malbone faras ion. Kelkfoje oni povas senti, ke la alia ne kondukis etike aŭ respekteme. Mi ne parolas pri tiaj situacioj. Vi jam scias, ĉu? Atendas multaj ILEI-kongresoj por plaĉi al ni. Ne forgesu, ke ni ne estas multaj. Kiam eta loka grupo prenas la defion organizi kongreson, ili jam gajnis rajton ricevi brakumojn, ne batojn. Ni kunhelpu, kunlaboru, kunantaŭvidu, kunumu... se vi ne faris tion, kiam tio estis bezonata, poste ĝuu, lernu kaj ne baru.

ILEI-Kongreso: bunta, riĉa kaj neforgesebla

de SABUYUMVA Jérémie, Rumonge (Burundo)

Ĝus finiĝis la 51-a ILEI-Kongreso, kiu okazis de la 21-a ĝis la 28-a de julio 2018 en Madrido, Hispanio, kaj kiu konis grandan partoprenon kompare kun aliaj kongresoj, kiuj okazis en la 5 pasintaj jaroj. Dum ĉi kongreso, ĉiuj kontinentoj estis reprezentataj. Pro diversaj kialoj mi ne povis partopreni en la ILEI-kongresoj antaŭe, sed ĉi tiun jaron mi partoprenis en mia dua ILEI-kongreso, post tiu, kiu okazis en Benino, en 2008. Survoje al la kongresejo, mi ekhavis diversajn pensojn kaj imagojn pri tio kiel okazos la kongreso kaj pri partoprenantoj. Mi jam havis informojn pri partopreno de kelkaj el miaj konatuloj, do estis okazo revidi unu la alian, kaj ankaŭ mi estis scivola vidi kiuj estos tie kaj kiujn neforgeseblajn memoraĵojn mi havos.

La kongreso okazis en du malsamaj konstruaĵoj, tre proksimaj inter si, en la universitata areo (t.n. *Ciudad Universitaria*) de la urbo kaj en la universitata rezidejo *Colegio Mayor Teresa de Jesús*, apartenanta al la komplekso de rezidejoj de la *Universidad Complutense* de Madrido. Inaŭguro, fermo kaj plejmulto de la programeroj de la kongreso de ILEI okazis en la Fakultato pri Humanecaj Fakoj (*Facultad de Humanidades*) de la Nacia Universitato por Ne-Ĉeesta Edukado (konata kiel UNED).

La kongreso allogis entute pli ol 248 esperantistojn el 33 landoj. La kongreso havis riĉan edukan (prelegan) kaj kulturalan programojn. La temo de la

kongreso estis: LA KULTURA HEREDAĴO DE ESPERANTO. Spertaj esperantistoj el diversaj mondopartoj estis invitataj prelegi pri diversaj temoj (kiuj rilatis al la kongrestemo) dum la simpozio; mi havis okazon prelegi pri justa komunikado kaj tutmondiĝo, kaj diskutis kun diversaj eminentaj esperantistoj pri la problemoj de lingvoj en la mondo. Vere estis interesa kaj instrua kongreso, kvankam mi ne povis partopreni en ĉiuj programeroj pro la bunteco kaj eĉ kvalito de ili; bonege elektitaj estis la programeroj.

Okazis kursoj de Esperanto por komencantoj, gvidataj de Esperanto-instruistoj el diversaj mondopartoj, kaj mi estis unu el la kurso-gvidantoj. De tio mi lernis, ke ILEI estas internacia organizo, kiu respektas kaj fidus siajn membrojn sendepende de ilia devenlando.

Dum la lingva festivalo estis prezentitaj multaj lingvoj, kiuj montris la diversecon de lingvoj kaj neceson protekti ilin. Ni povis aŭdi salutvortojn de diversaj lingvoj, kaj eĉ ni kantis en kirundi kaj svahili.

Okazis komitatkunsidoj de ILEI, kiuj naskis novan estraron de ILEI por la venonta mandatperiodo.

Dum la internacia vespero, ni ĝuis per kantoj, muziko kaj rakontoj el diversaj mondopartoj, kaj vere, ni ĉiuj estis malkontentaj, kiam oni anoncis al ni la finon de la internacia vespero. Vendredon, dum la adiaŭa vespero, larmoj fluetis de okuloj de kongresanoj, ĉar ni estis kiel familio dum la semajno, kaj ĉiam disiĝo estas malfacila. La grupo Kajto plibonigis la adiaŭan etoson, kaj ni ĉiuj kune kantis la adiaŭan kanton. Sabaton okazis karavano al la UK, kiu estis kiel kroma tago de la ILEI kongreso, ĉar en busoj daŭre okazis interesaj rakontoj, ŝercoj...

Estis bone aranĝita kongreso kaj okazo konatiĝi kun hispanaj esperantistoj kaj kun la kongresurbo, kiu estas konata en la mondo.

Raporteto de Adjévi ADJE (Togolando)

Fakte mi alvenis en Eŭropon la 22-an de julio kaj revenos al Togolando la 30-an de aŭgusto 2018. Mi do ĉeestis en la ILEI-Kongreso en Madrido, Hispanujo. Tie mi ne povis prezenti mian lingvon, la evean, dum la Lingva Festivalo pro malfrua alveno, tamen mi partoprenis en multaj aliaj kongresaj eroj kaj prezentis en salono al ĉ. 30 ĉeestantoj la kontribuon de afrikaj esperantistoj al la Esperanto-komunumo el la kultura vidpunkto. Mireille Grosjean, prezidanto de ILEI, mem partoprenanto en la programo *Esperanto Plus*, estis fakte la unua, kiu en la madrida renkontiĝo elpaŝis publike pri

Esperanto Plus en sia prelego pri la kongresa temo. Kun ŝi kaj aliaj du afrikanoj mi poste partoprenis en la internacia vespero per kunkantado de „Malaika” antaŭ abunda publiko en Madrido kaj en Lisbono. Dankon, Mireille, pro via kunkanta propono.

La hispana ronda familio

de Aurora BUTE (Rumanio)

La plej grava evento de ILEI, la Kongreso, okazis ĉi-jare en la hispana ĉefurbo, Madrido. Riĉa kaj bunta kongreso, sed mi ŝatus substreki kelkajn personajn rimarkojn.

Unue, temas pri la fakto, ke la hispana E-agado disponas je homoj taŭgaj por io ajn dumkongrese farenda: ĉu esperantistoj por akcepto de la gastoj? Estas! Ĉu hispanoj por prezenti programerojn? Amaso da ili: poetoj, prozistoj, vortaristo, deklamanto, teatra reĝisoro. Ĉu universitatanoj prezentantaj siajn universitatojn? Jen ili! Ĉu profesia muzika grupo por animi vesperon? Estas gastoj sed ankaŭ hispana tia grupo! Ĉu kantisto por la nacia vespero? Estas

hispana E-poeto kaj tenoro! Ĉu ĉiĉeronoj por aro da ekskursoj? Aro da ĉiĉeronoj, ankaŭ junuloj!



Kaj homo kiu kunordigu ĉiujn? Estas! Sed tio, kio plej rimarkindas, estas la etoso inter la hispanoj: ili rilatas unu al la alia kiel parencoj, kiel familianoj, en plena harmonio. Kaj tie, kie estas harmonio, ĉio iras glate. El kio fontas la harmonio? Miaopinie el respekto, el sama celo, el bela karaktero. En familio, laborgrupo, komunumo se estas respekto, estas harmonio kaj ĉio solveblas, ĉio disvolviĝas laŭ-

plane, ĉar ĉiuj pensas, sentas kaj agas samcele.

Mahatma Gandhi asertis, ke „la feliĉo estas la harmonio inter tio, kion vi pensas, diras kaj faras”. Ni diru, ke modela E-agado estas la harmonio inter tio, kion ni pensas, diras kaj faras.

Respekton do, al la hispana ronda harmonia familio!

Lingva Festivalo gvidata de du altnivelaj fakuloj

de Mireille GROSJEAN (Svislando)

En Madrido nia Lingva Festivalo okupis la tutan posttagmezon de dimanĉo. La gvidantino estis Irina GONĈAROVA, kiu estas arda disĉiplo de la kreinto Dennis KEEFE, kiu ankaŭ ĉeestis.

**Bonvenon al
La LINGVA FESTIVALO de ILEI, HEF
Madrido, 2018**

Konsilantaro	Ĉambro	Kap.	18h30		17h00		17h45		18h30		19h15		20h00		20h45	
			Kap.	Malfermo	Lingvoj	Lingvoj	Lingvoj	Lingvoj	Lingvoj	Lingvoj	Ferme					
Colegio Mayor Teresa de Jesús	Ĉambro Redondo	100			Japana	Itala	Esperanto		Franca		Korea					
Colegio Mayor Teresa de Jesús	Ĉambro Ada	14			Ĉuvaŝa	Hungara	Rumantsch	Rumana	Ĉeĥa							
Colegio Mayor Teresa de Jesús	Ĉambro Verda Majco	14			Kroata	Kenuda	Okcitana	Ĉiluba			Egipta malnova					
Colegio Mayor Teresa de Jesús	Ĉambro Ridulo	120	Solana Malfermo		Portugala	Ĉina	Rusa	Svahila	Kroata			Solana Ferme				
Colegio Mayor Covarrubias	Ĉambro Cañu	29			Tekipona	Angla	Armena	Pola			Nepala					
Colegio Mayor Covarrubias	Ĉambro Baghy	140			Egipŝa	Kataluna	Hispana	Frisa	Nederlanda							

Ni povis uzi diversajn ĉambrojn sub la sama tegmento, ideala loko. Ni ricevis precizan tempoplanon kaj povis plani nian partoprenon laŭ nia plaĉo. Ni estis en la universitato, tamen la gestudentoj feris. Ni estis inter ni.

Kun 33 naciecoj en nia

Kongreso ni havis grandan kvanton da lingvoj, entute 28 lingvojn. De la malnova egipta ĝis la tokipona... tra la tuta historio kaj la tuta geografio.

Laŭ preciza tempoplano po unu denaskulo prezentis sian lingvon, prezentis la lingvofamilion, al kiu ĝi apartenas, difinis la teritorion, kie ĝi estas parolata, kaj parolis la lingvon, por ke la publiko aŭdu ĝin. La publiko povis ekkoni novajn lingvojn kaj malfermi sian horizonton. „La limoj de miaj lingvoj estas la limoj de mia mondo”, laŭ Wittgenstein. Kompreneble ne eblis lerni novan lingvon, novajn lingvojn, sed simple iom flari ilin.

Okazis malferma kunsido, kie la organizantino prezentis la gvidantojn. Ĉiu venis kun frazo en sia lingvo, la sama frazo: ĈIU KULTURO ESTAS VALORA KAJ GRAVA. Jen ĉiuj lingvoj prezentitaj: la japana, itala, franca, kroata, korea, ĉuvaŝa, hungara, romanĉa, rumana, ĉeĥa, ĉiluba, okcitana, malnova egipta, portugala, rusa, ĉina, svahila, tokipona, angla, armena, pola, nepala, kataluna, hispana, frisa, nederlanda kaj Esperanto.

Okazis ferma kunsido, analizo, bilanco, kaj ĉiuj partoprenantoj, ĉu gvidantoj ĉu publiko, esprimis sian kontenton. Ni povis ekscii pri la diversaj eventoj pri lingvoj, kiuj povas esti Lingva Festivalo, Lingva Foiro kaj similaj, kaj aŭdi pri iliaj avantaĝoj kaj malavantaĝoj. Por mi persone, mi devis iom honti, ĉar mi prezentis la lingvon Rumantsch Grischun, la kvaran svisan lingvon post la germana, franca kaj itala. Tamen mi ne parolas ĝin, krom *allegra*, *bun di*, *pach* (bonan tagon en du malsamaj idiomoj, paco). Tiun lingvon mi volis

prezenti, ĉar oni kreis ĝin en 1985 el tri el la ses romanĉaj idiomoj. Do planlingvo iom kiel Esperanto. Kun similaj kaj malsimilaj aspektoj.

Vidu la kovrilpaĝon de tiu ĉi numero de IPR, tie vi vidas Jérémie SABIYUMVA el Burundo. Li prezentis sian lingvon, la kirundan, kaj la komunan lingvon de orienta Afriko, la svahilan lingvon.

Niaj novaj estraranoj

Karine ARAKELJAN



Naskiĝdato: 5.07.1954; **Naskiĝloko:** Armenio

Klereco: Supera – ekonomiko kaj financoj, teknika (inĝeniero), lingva (angla), muzika (piano)

Scienca grado: Magistro pri komerca administrado (Amerika Universitato de Armenio)

Profesio: Komerca konsilanto, tradukistino, lingva instruistino, pianistino

Membreco: Asocio de Armenaj Esperantistoj, UEA, IRE

Lingvoscio: Esperanto, la armena, rusa, angla

Publikaĵoj: Multaj artikoloj kaj tradukoj aperintaj

en diversaj lokaj kaj internaciaj revuoj kaj Esperanto-eldonaĵoj. La Esperanto-armena-rusa kaj armena-Esperanto-rusa vortaroj, preparado kaj eldono de la armena versio de la lernolibro de Stano Marček *Esperanto per Reka Metodo*. Partopreno en preparado de vortaroj, lernolibroj kaj alia speciala literaturo (ekonomiko, financoj, negoco ktp) kiel tradukisto kaj redaktisto.

Mallonga vivrakonto

Mi laboras en kontkontrola (audit) firmao Baker Tilly Armenia, kie mi estras la fakon de revizora metodologio. Mi faris multajn tradukajn kaj redaktajn laborojn por diversaj internaciaj organizaĵoj kiel USAID, Sibley International, Monda Banko ktp.

Mi ĉiam havis fortan intereson pri lingvoj kaj interlingvistiko kaj en juneco memstare lernis kelkajn fremdajn lingvojn krom jam bone povosci la rusan kaj la anglan. Esperantujon mi eniris en 1980 kaj komencis aktivan agadon direktitan al antaŭenigo de la Esperanto-movado en Armenio.

Mi estris la instrumentodikan sekcion de la Armenia Esperanto-Asocio, ekzamenan komisionon de la Asocio, kaj la Centran Esperanto-Klubon dum

pli ol dudek jaroj. En 2006 mi fondis la Armenan Kultur-Klerigan Centron „Espero”.

Mi partoprenis en Universalaj Kongresoj en Belgio (1982), Hungario (1983), Pollando (1987), Litovio (2005), Nederlando (2008), Francio (2015), Koreio (2017); mi partoprenis ankaŭ en diversaj aliaj Esperanto-aranĝoj, konferencoj, kongresoj (Ĉeĥoslovakio, Ĉinio, Irano, Germanio, Italio, Kartvelio ktp.). Dum la kongresoj kaj konferencoj mi faras prelegojn pri la Armena E-movado, Armena kulturo, lingvaj problemoj, Esperanto-edukado kaj instruado, kaj aktive partoprenas en la kongresaj artaj programoj.

Mi iniciatis kaj preparis Esperanto-aranĝojn en Armenio (Internacia Esperanto-renkontiĝo, Internacia Somera Lernejo ktp.), estis loka organizanto de Mezorianta Kunveno en Armenio (2013) kaj de postkunvenaj ekskursoj en Armenio (2017). Mi okupiĝas ankaŭ pri tradukado kaj redaktado (ekzemple, de la revuo „Juna Amiko”).

Mi trapasis superan nivelon de KER-ekzameno en aŭgusto 2010 kaj estas en la listo de la Internacia Rajtigita Ekzamenantaro. En 2011-2013 mi estis sekretario de IEK, kaj ekde 2013 – ĝia prezidanto.

JUNG Yuro „Unika”

Naskiĝdato: 10.11.1985; **Naskiĝloko:** Suda Koreio
Japana oficiala nomo: SETO Nika

Klereco: Komputila scienco de inĝenierado (programado, retumado, artefarita inteligento, konstruado de retpaĝoj), Kulturaj aktivajoj, negoco (administrado, financo, merkato, analizado), Lingvoj (angla, japana, korea, esperantologia, lingvistika), Muziko (fortepiano, drumo)

Scienca grado: Magistro pri administrado kaj komerco (MBA) – Aoyama Gakuin-Universitato, Japanio, 2019

Profesio: Komercesto, negoca konsilanto, tradukistino, lingva instruistino, dezajnistino

Membreco: Japana Esperanto-Instituto, Korea Esperanto-Junularo, esperantista muzikbando K-ON, UEA, ILEI, TEJO, IKEF

Lingvoscio: Esperanto, korea, japana, angla, hispana, itala, malaja-indonezia, sanskrita, gota



Mallonga vivrakonto

Mi nun studas administradon kaj komercadon en Aoyama Gakuin-Universitato en Japanio, kaj samtempe mi studas interlingvistikon kaj Esperantologion en Universitato Adam Mickiewicz en Poznano, Pollando. Samtempe mi laboras kiel estrino de mia propra entrepreneto, kiu havas esperantistan celon.

Mi naskiĝis en Esperantujo en la jaro 2007, en mia universitato „Hankuk-Universitato de Fremdaj Studoj”, Koreio, kie okazis la 102-a Universala Kongreso de Esperanto, en 2017. Kvankam mi studis en universitato de fremdaj studoj, mia fako estis komputila scienco de inĝenierado. Ĉefe mi studis programadon kaj persone ŝatis faradi retpaĝon kiel kromlaboron. Bonŝance mi havis spertojn kiel vicprezidantino de Korea Esperanto-Junularo kaj prezidantino de Esperanta klubo de mia universitato „Kolombo”.

Dum kelkaj jaroj, mi ĉefe partoprenis kaj aktivis en la junulara movado en Azio. Komencaj spertoj estis daŭre partopreni en Komuna Seminario inter junuloj de Koreio, Japanio, Ĉinio kaj Vjetnamio (KS), dum pli-malpli 6 jaroj. Unu el la spertoj de KS donis al mi grandan oportunon por iĝi ĉeforganizanto de KS, kaj ĝi okazis samtempe kun la 1-a Komuna Esperanto-Kongreso de Japanio kaj Koreio en 2011.

Post mia diplomiĝo ĉe universitato, mi translokiĝis al Japanio por labori ekde la jaro 2012. Mi eklaboris en transporta firmao en Japanio. Dum mia laboro, mi lernis diversajn aferojn pri komerco, kvankam mia fako tute ne rilatas al ĝi. La sperto en mia laborejo vere multe helpis solvi mian scivolemon pri kelkaj problemoj de la junulara Esperanto-movado en Azio. Mi havis hipotezon pri ĝi ĉefe rilate kun Azio, kaj ekhavis deziron studi pri komercaj kaj administraj aferoj. Mi daŭre solvemis „Kiel restigi junulojn en Esperantujo?” Ĝi estis mia ĉefa temo el diversaj taskoj.

Mi komencis studon en Aoyama Gakuin-Universitato, kaj dum la studado mi legis anoncon pri interlingvistika studo en Poznano. Mi sentis bezonon studi pli profunde Esperanton kaj komencis tion en septembro 2017. Pere de interlingvistika studado en Poznano, mi deziras studi „Kiel plibonigi instruadon por komencantoj de Esperanto laŭ interlingvistika vidpunkto”. Kaj sendube interlingvistika studo de Poznano nutros min por sekvanta aktivado en Esperantujo.

ILEI dum la UK en Lisbono

de Mireille GROSJEAN (Svislando)

Por ILEI, UK estas tre grava evento. ILEI povas aperi diversmaniere kaj prezenti siajn strukturon kaj agadojn. Ni konsideru tiujn aperojn de ILEI dum UK laŭ kronologia skemo.

Movada Foiro. Tie ILEI havas budon kaj povas prezenti sin. Kelkaj numeroj de IPR kaj de Juna Amiko (JA) estas tie, tamen rapide malaperas okaze de disdonado.

Solena malfermo. Estas kutimo, ke la prezidanto de ILEI sidas sur la podio kun la tuta estraro de UEA, apud la prezidantoj de TEJO kaj de la Akademio. Plie la prezidanto de ILEI havas kelkajn minutojn por paroli al la tuta kongresanaro. Tion mi faris en Lisbono. Mi uzis tiun momenton por alvoki al tradukonto de kantato pri Homaj Rajtoj por la 70-jariĝo de la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj. La komponistino Colette Mourey arde atendas esperantlingvan tekston por sia muziko. La kantato aŭdiĝos ĉe UNESKO. Kvar personoj poste kontaktis min, ŝajnas ke la afero survojas.

Budo en la enirhalo. Estas kutimo, ke ILEI ricevas senpage tablon en la granda akceptejo. Tie oni trovas informilojn pri ILEI kaj ekzemplerojn de niaj du revuoj. La blua flago de ILEI ornamas la tablon kaj altiras interesatojn.

Subskribo de Interkonsento pri kunlaboro fare de la prezidanto de la



Universitato kaj Esperanto-Muzeo de **Zaozhuang**, provinco Ŝandong, Ĉinio, la prezidanto de UEA Mark Fettes kaj la prezidanto de ILEI Mireille Grosjean.

Tiu solena evento okazis fine de la dimanĉo en granda salono [vd. la apudan *foton*].

Tago de la Lernado. Ĝi okazas marde matene, de la 9-a horo ĝis la 15-a horo. Sinsekvo de prelegoj altiras publikon. Kutimo estas, ke la unua prelego estas prezento de la instrusistemo de la gastiganta lando. Tio okazis en Lisbono per prezento farata de Profesoro Joao José Santos. Poste ni povis

aŭskulti prelegojn de Duncan Charters, Renée Triolle, István Ertl, Barbara Pietrzak, Marija Belošević, Julián Hernández Angulo, Zsófia Kóródy, Mónika Molnár kaj Keyhan Sayadpour. La gvidadon havis Profesoro Duncan Charters, kiu kutimas subteni la Ligon per tia ne ĉiam facila tasko.

La Premio Mauro La Torre estis en 2018 aljuĝita al D-rino **Alessandra Madella** el Italio, laboranta en Kunming, Ĉinio. La transdono de la Premio okazis tutkomence de la Tago de la Lernado (*vd. la internan kovrilpaĝon*).

Komitato de UEA. Kiel aliĝinta organizo ILEI rajtas havi unu komitatanon A en la Komitato de UEA. Mi deĵoras jam ekde 2013 tie kaj reprezentas la Ligon dum UK-oj.

Programero pri ILEI. Dum la semajno aperas 90-minuta kunsido pri ILEI. Mi gvidis ĝin kaj povis prezenti al la publiko la du novajn estraranojn de ILEI: Karine Arakeljan kaj Unika. Do ni trioje sidis sur la podio. Mi prezentis en resumo la agadojn de ILEI laŭ tri ĉapitroj: la ĉiutaga mastrumado de la Ligo, la projektoj, kiuj survojas, kaj fine la projektoj ankoraŭ ne komencitaj. Tiu strategio alportis fruktojn: du personoj venis al mi por anonci pretecon kunlabori en iu preciza kampo.

Nia UK-a anĝelo estis Marija Belošević. Ŝi helpis al mi prepari la Tagon de la Lernado, tiel bone, ke la estraro de ILEI nomumis ŝin Komisiito por la apero de ILEI ĉe UK. Post diskuto kun mi pri la temo de la Tago de la Lernado, ŝi esploris pri prelegantoj, starigis la programon, zorgis pri la budo (mi devis alvoki por trovi helpantojn, ĉar ne decas, ke ŝi sidu en la budo dum la tuta Kongreso....), zorgis pri la Movada Foiro. Plie ŝi fotadis multe kaj liveris al la Ligo belegajn dokumentojn. Do la sukceso de la apero de ILEI dum la UK estas ŝia sukceso. Koran dankon, Marija!

NITOBESIMPOZIO POST LA UK: GRAVA EVENTO POR ILEI

de Mireille GROSJEAN (Svislando)

Tuj post la fino de la UK, sabaton, la 4-an de aŭgusto, komenciĝis en alia loko de Lisbono NITOBESIMPOZIO. Temas pri la sepa tia universitatnivela evento. Vidu foton kun la listo de jaroj kaj lokoj. La organizanto estis Esperantic Studies Foundation (ESF) kaj la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED).

Tiu simpozio havas la nomon de NITOBESIMPOZIO Inazo (1862-1933), ĉar tiu klera japano, vic-ĝenerala sekretario de la Ligo de Nacioj, provis klarigi al okcidentanoj la pensmanieron de orientanoj, verkante ekzemple la faman

libron „Bushido”. Li estas tre konata kaj ŝatata en Japanio, tamen vivis ĉefe en Genevo, ĉar tiu urbo estis la sidejo de la Ligo de Nacioj inter 1920 kaj 1939. Nitobe esploris por la Ligo de Nacioj pri Esperanto, partoprenis en unu Universala Kongreso kaj verkis raporton pri la uzo de Esperanto. Li estis favora al nia Movado.


https://eo.wikipedia.org/wiki/Nitobe_Inazo

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Nitobe-simpozio>

Pri Nitobe en la dulingva blogo de Mireille Grosjean

<https://mirejo.blogspot.com/2009/02/nitobe-inazo.html>

En la ĵus finiĝinta Nitobe-simpozio partoprenis inter aliaj (sen titolo por ne ofendi iun ajn) Sabine Fiedler, Ilona Koutny, Katalin Kováts, Duncan Charters [*surfote videblas parto de lia prezentado*], Dennis Keefe, Peter Balaž, Grant Goodall, Michele Gazzola, Jorge Antonio Leoni de Leon, Christer Kiselman, Maria Majerczak, Brian Moon, Orlando Raola, kaj forta skipo da brilaj hispanoj; inter ili ni citu Javier Alcalde, la ĉeforganizanton, Juan Diego Diaz Bautista, Vicente Manzano Arrondo, Roberto Garvia. Giridhar Rao kontribuis alportante azian venton kaj senton.



Partoprenis plie diplomatoj aŭ eks-diplomatoj, ili estas Sean O’Riain, Jozefo Reinart kaj Ulrich Brandenburg. Neesperantistino esprimis sin en la angla: Zorana Sokolovska, kiu esploras en Friburgo, Svislando, pri la uzo de Esperanto. La gvidadon havis Humphrey Tonkin.

La temo estis la instruado, la uzo, la apero de Esperanto en universitatoj. Unue estis klare difinite, ke povas okazi en universitato simpla lingvokurso, kaj en aliaj establoj okazas kurso pri lingvistiko aŭ interlingvistiko, kiu traktas la fenomenon Esperanto. La grupo povis aŭskulti la rezulton de la vasta enketo farita por ESF de Juan Diego Diaz Bautista helpata de Vicente Manzano Arrondo. Kompreneble aŭdiĝis analizoj pri la historio kaj pozicio de la Interlingvistikaj Studoj en Poznano, Pollando, gvidataj de Ilona Koutny (*vidu artikolon de Ilona Koutny en IPR 2017 4 paĝoj 11 – 15*) kaj de la

Katedro pri interlingvistiko kaj Esperanto en Amsterdamo, Nederlando, kie nuntempe instruas Federico Gobbo.

Kompreneble aŭdiĝis la problemo de kolektado de faktoj cele al starigo de validaj kaj uzeblaj statistikoj, post la fino de la kolektado de donitaĵoj faritaj dum multaj jaroj de Germain Pirlot en Belgio. Nuntempe ĉiu kursgvidanto estas petata registri sian kurson, sendepende de la tipo, en la retejo www.edukado.net. Tiu retejo, prizorgata de Katalin Kováts, utilas kiel referenco por tiaj donitaĵoj. Tio signifas, ke ILEI ne faras paralelan kolekton.

La partoprenantoj skizis la bezonon, ke Esperanto aperu ankaŭ en aliaj fakoj, kiel socio-lingvistiko aŭ sociaj sciencoj ĝenerale. Bonan ekzemplon donis Vicente Manzano Arrondo, kiu instruas psikologion en la universitato de Sevilo, Hispanio. Li prenis nian lingvon kiel studobjekton por instrui pri esplorado de ne konata temo, starigis diversajn demandojn kaj defiojn al siaj gestudentoj, kiuj devis enketi pri la reago de la publiko al Esperanto kaj al uzado de diversaj aliaj lingvoj kaj science analizi la rezulton de tiaj esploroj.

La universitata mondo, la universitata sistemo, estas grava temo, kiam kunvenas universitataj profesoroj. Kiel eskapi el la tutmonda „koka-kolanizado”, el invado de la angla lingvo, kiun sekvas la fama postulo verki siajn artikolojn en la angla lingvo? Por konstrui sian karieron, iu profesoro iel iom „devas” sekvi tiun vojon. Sugesto aŭdiĝis, ke endus publikigi artikolojn en du lingvoj, ne nur en la angla. Pri tiu rezisto Vincente Manzano Arrondo publikigis artikolon en IPR 2017/4, paĝoj 23-25.

ILEI en siaj diversaj laborkomisionoj havas Komisionon pri Universitata Agado. En ĝi membras Duncan Charters (gvid.), Ivan Colling, Renato Corsetti, Kimura Goro, Ilona Koutny, Radojica Petrović, Kristin Tytgat, GONG Xiaofeng „Arko”. Nuntempe mankas motoro en tiu Komisiono, tamen povus esti, ke la Nitobe-simpozio efikos kiel vekhorloĝo aŭ tertremo por tiu Komisiono. Povus esti, ke plia persono membriĝu, eĉ pliaj personoj.

Plano aperis, ke iu aŭtoro aŭ grupo verku manlibron pri interlingvistiko. Tia manlibro povus faciligi la enkondukon de tia fako en aliajn universitatojn. La kurso de Vera Barandovska-Frank povus esti bazo de tia bezonata verko.

Evidente ILEI akceptos kun plezuro novajn membrojn, ili povus esti universitataj profesoroj. ILEI enkondukis jam de pluraj numeroj de IPR la kutimon, ke aperu kiel ĉefartikolo teksto en universitata maniero, tio estas kun prezento de la aŭtoro, resumo, teksto kaj bibliografio. Tiel tiaj valoraj kontribuoj povas aperi valide en bibliografioj.

ILEI klopodas, okaze de siaj kongresoj, organizi simpozion en kunlaboro kun la universitato de la gastiganta urbo. Tia evento brile sukcesis en Kopenhago, Danlando, en 2011 kaj poste en diversaj kongresoj inkluzive en Madrido, UNED, en 2018. La ILEI-simpozio en 2017 ne okazis en la kongresa urbo Pusano, sed en Seŭlo, Koreio, kadre de UK, en la Hankuk-Universitato por Fremdaj Studoj HUFUS.

6-jaraj instruistoj

La freneza ideo de svisino kaptas la atenton en Parizo.

(laŭ artikolo aperinta en „Arc Info”, franclingva svisa gazeto, la 27-an de aprilo 2018)

La instruistoj estas 5- ĝis 7-jaraj. La lernantoj estas 3- ĝis 7-jaraj. Iu filmas la instruistojn, kiuj en sia denaska lingvo prezentas bestojn, ludojn, objektojn, per simplaj frazoj. Do la lernantoj vidas kaj aŭdas samaĝulojn. La filmetoj daŭras maksimume 10 minutojn. „La lernantoj lernas 500 vortojn kaj esprimojn ene de 18 monatoj” asertas la kreinto Nathalie Lesselin. Ŝia projekto, kies japandevna nomo estas „kokoro lingua” (kokoro signifas koro), estis elektita por partopreni en la konkurso Lépine en Parizo okaze de la pariza foiro. Ŝi mem miras pri sia sukceso. Nuntempe la filmoj prezentas la anglan lingvon, sed ŝi planas iri al aliaj lingvoj. Diversaj privataj lernejoj en Svislando uzas tiun metodon kun pozitivaj spertoj.

Komento de Mireille Grosjean

La lernantoj vidas kaj aŭdas samaĝulojn. Tie kuŝas la sukceso de tia metodo. Mallongaj filmetoj gajaj kaj amuzaj altiras la atenton de la infanoj kaj io restas de la parolata lingvo. Do okazas akiro de kelkaj vortoj kaj nocioj. Kion ni povus ĉerpi el tia prezento? Certe en familioj kun Esperanto-parolantaj infanoj estus facila afero produkti filmetojn. Facila enhavo, natura parolado, sen ia pozado aŭ postuloj.

„Jen mia pupo. Ĝi estas granda kaj bela. Mi ŝatas ĝin. Mi promenas kun ĝi...”

„Tio estas kulero. Tio estas forko. Tio estas telero. Tio estas glaso. Tio estas taso....”

La daŭro de la filmetoj povus esti eĉ pli mallonga; triminutaj filmetoj tute bone taŭgas. Tiuj filmetoj estus bona ilo por geavoj, kiuj volus aŭdigi Esperanton al siaj genepoj. Kompreneble jam ekzistas multaj filmoj ĉe Youtube kun rakontetoj en Esperanto. Estus pozitiva aldono al ili.

„Mi pequeña gramática de Esperanto” de Peter Weide

recenzo de Vicente MANZANO-ARRONDO (Viko)

Nur 30 paĝoj! Mirinde! Weide sukcesas aranĝi en eta spaco egan enhavon. Komprenoble, oni ne rajtas esperi, ke tia gramatika manlibreto havu sufiĉan amason da ekzemploj kaj ĉiutagaj situacioj por plene posedi la lingvon. Tion eĉ ne atingas la fama PMEGo, kiu estas konata de preskaŭ ĉiuj, kelkfoje malfermita de multaj, parte studata de pluraj, kaj tralegita de preskaŭ neniu. La Weidea libreto temas pri aranĝita promeno sur la lingva Esperanta vojo tra ĝiaj eroj: kiuj ili estas (substantivo, verbo ktp.), kiel ili miksiĝas por realigi frazojn (afiksoj, akuzativo ktp), kio okazas pri kelkaj flankoj el la lingvo (tabelvortoj, komparadoj ktp.), kaj kiel scii pli (datoj, utilaj retpaĝoj). Ĉiumomente, la aŭtoro klopodas sekvi la saman logikon por ĉiu lingva elemento: nomo, rolo, klarigoj, ekzemploj.

Vi havas en tiu paĝaro bonan ilon por apogi la lernadon de viaj komencantoj pere de rimedo, kiu povas roli kiel manlibreto por esti konsultita laŭbezone. Ne esperu luksan eldonon sed utilan. Kohere, ne esperu multekostan decidon. La kajero kostas 3,50 € plus sendokostoj, ĝi estas mendebla ĉe peter.weide@mail.dk. Tamen vi povas mendi mil ekzemplerojn por via sukcesa kurso kaj atingi bonan rabaton.

Pliajn informojn vi trovos sur la retpaĝo <http://esperanto-gramatiko.saluton.dk/esperanto-gramatiko-superrigardo/espagnol>.

Noto de la redaktoro: Tiu ĉi libreto ekzistas nun en dana, germana, angla, franca, itala kaj hispana versioj. Legu komentojn ĉe <http://esperanto-gramatiko.saluton.dk/esperanto-gramatiko-superrigardo/Esperanto-gramatiko%20informoj/>.



El la landoj kaj sekcioj...

Hispanio

Faka kunveno okaze de la Kongresoj de HEF kaj ILEI

Sur la komuna programo de la Kongresoj aperis en sabato la 21-a de julio je 18:30: **Kunveno de la hispana ILEI-sekcio.** Konsekvence mi iris al tiu kunveno. Ni diskutis kvarope pri la situacio en Hispanio, kiu ne estas tute

kutima. Kial? Ĉar en 1999 estis kreita Kataluna ILEI-sekcio, kaj en 2014 estis kreita Hispana ILEI-sekcio. La sekciestro de Kataluna ILEI-sekcio, Ruben Fernandez Asensio, partoprenis en la Kongreso kaj la kunveno. Ankaŭ partoprenis Felix Lobo, kiel membro de ILEI kaj de HEF, Hispana Esperanto-Federacio, kiu bone konas la evoluon de HEF kaj la ekesto de la Hispana sekcio de ILEI.



La sekciestro de la Hispana ILEI-sekcio, Prof-ro Eduardo Berdor, sendis reprezentanton, temis pri Prof-ro Carlos Spinola. Tia situacio, la ekzisto de tiuj du sekcioj, eblas, ĉar en la statuto de ILEI oni legas, ke sekcio ekzistas sur difinita *teritorio*. Ne aperas la vorto *lando* aŭ *ŝtato*. Pro tio la katalunoj povis unue ekpaŝi kaj aliĝi al ILEI en teritorio, kie neniu strukturo aŭ sekcio de ILEI ekzistis. En Katalunio membroj de HEF povas aliĝi aŭ al la Kataluna sekcio aŭ al la Hispana sekcio de ILEI.

La diskuto okazis malfermite kaj amike. La kunvenantoj priskribis la situacion, la instruadon de Eo en Hispanio, prezentis la historian evoluon de tiu en Barcelono, Madrido kaj en aliaj regionoj de la iberia duoninsulo. Planoj, bezonoj, ebloj estis menciitaj. Fruktozona ideointerŝanĝo.

Raportas Mireille GROSJEAN

Hungario

Enikő SEREGHYNÉ ZENGŐ (1955 – 2018)



La 5-an de majo 2018 forpasis Enikő SEREGHYNÉ ZENGŐ, estrarano de ILEI-HU, iama estrarano de ILEI.

Enikő estas instruistino pri Esperanto kaj la germana lingvo. Ŝi ekkonis la lingvon en la jaro 1979. Ŝi partoprenis tiam en diversaj kursoj en Hungario kaj en eksterlando, parte laŭ la Ĉe-metodo. Tiam ŝi laboris en infanĝardenoj kaj konatigis la 3-6-jaraĝajn infanojn kun Esperanto kaj kun la germana lingvo, parte por eltrovi kiel tio eblas. En 1980 Enikő trapasis superan ekzamenon pri Esperanto kaj poste komencis siajn studojn en la fako Interlingvistiko kaj Esperantologio en la universitato de Budapeŝto, kie ŝi diplomiĝis en 1989.

En la jaro 2003 la dekanino de la Universitato de Debrecen invitis ŝin por ekzameni pri Esperanto. Enikő finis pluperfektigan kurson por ekzamenantoj en Budapeŝto kaj ricevis permeson ekzameni en la Ŝtata Fremdlingva Ekzamena komisiono (ITK). Ekde tiam ŝi havis rajton ekzameni kaj en la unulingva kaj en la dulingva ekzamenoj. Ŝi instruis Esperanton en du lingvolernejoj de la urbo Nyíregyháza, en la Pedagogia Altlernejo „Comenio” en urbo Sárospatak, en la Universitato de urbo Nyíregyháza kaj ankaŭ eksterlande.

Ekde la jaro 2008 Enikő estis membro de la estraro de la Hungaria Esperanto-Asocio, kie ŝi estis i.a. la respondeculo pri instruado. Ŝi estis membro de ILEI-HU ekde 2004, estrarano de ILEI-HU ekde 2008, kaj inter 2012 kaj 2015 ankaŭ estrarano de ILEI. Kiel estraranino de ILEI-HU, ŝi multe helpis en la organizado de la Pedagogiaj Tagoj por instruistoj pri Esperanto. En la jaro 2014, laŭ la peto de la dekanino en la Komunikada Centro de la faklingvoj kaj fremdlingvoj en la Altlernejo de Nyíregyháza, ŝi ellaboris projekton por la instruado de Esperanto laŭ la KER-ekzamensistemo, en niveloj B1-B2-C1. Laŭ tiu programo oni instruis Esperanton en la Altlernejo ekde la jaro 2015. Ŝi partoprenis en pluraj UKoj kaj ILEI-Konferencoj kaj helpis la organizadon de diversaj eventoj, ekzemple tiun de IJL (Internacia Junulara Lingvotendaro), en la jaro 2013 ŝi mem organizis la tendaron en la urbo Nyíregyháza.

En la jaro 2016 ILEI-HU ricevis la rajton organizi la 49-an Konferencon de ILEI en Nyíregyháza. La sukcesa kandidatiĝo kaj la organizado ŝuldiĝas ĉefe al la iniciatemo kaj energia laboro de Enikő. Ŝi estis la gvidanto de la LKK, kaj dum tiuj du jaroj de la organiza periodo ŝi estis ankaŭ la sekiestro de ILEI-HU. Ŝi informis min pri sia malsano fine de 2016, sed ni esperis, ke ŝi venkos ĝin. Ŝi neniam plendis. La lastan fojon ŝi kontaktis min unu semajnon antaŭ la morto, dezirante al mi feliĉan naskiĝtagon. Eĉ tiam Enikő ne plendis, kvankam ŝi havis grandajn dolorojn. Nun ne plu. Oni adiaŭis ŝin la 17-an de majo 2018 en la urbo Balsa. Kara Enikő, ripozu en paco!

Jozefo NÉMETH

Csilla BERÉNYI (1976 – 2018)



La 2-an de junio 2018 forpasis Csilla BERÉNYI, hungara membro de ILEI.

En 1996 Csilla eklernis la germanan kaj poste Esperanton en la filologia fakultato de la Universitato ELTE en Budapeŝto, ŝi diplomiĝis kiel instruisto pri Esperanto kaj la germana lingvo. La diplomalaborajon ŝi verkis pri la komparo de Esperanto-kursoj, en kiu laboro ŝin helpis la gvidanto de LINGVO-Studio, László Szilvási. Ŝi instruis la germanan kaj Esperanton al mezlernejoj kaj plenkreskuloj ekde 2001 en Budapeŝto (post sia transloĝiĝo al urbo

Pécs, ankaŭ tie). Ŝi laboris en la distrikto Csepel, poste en diversaj lingvolernejoj (ekz. Ring, Danubius). Csilla instruis la germanan en ELTE inter 2010 kaj 2011 kaj Esperanton en Nemzetközi Oktatási Központ (Internacia Instrua Centro). Ŝi instruis Esperanton ĉefe al junuloj kaj mezaĝuloj en la lingvolernejo LINGVO-Studio de la Budapeŝta Esperanto-Centro ĝis la jaro 2017. Multaj centoj da studentoj ŝuldas al ŝi sian Esperantan lingvoekzamenon. Ŝi estis unu el la plej bonaj instruistoj en la lando... Krom la instruado, ŝi estis spertulo pri pedagogiaj temoj kaj helpis elprovi la novajn pedagogiajn ilojn. Ekde la jaro 2004 ŝi estis ekzamenanto pri Esperanto en la ekzamencentro Origo.

Ekde sia universitata studado ŝi partoprenis en la junulara movado kaj en la laboro de la teamo de Kultura Esperanto-Asocio kaj estis membro de ILEI-HU. En sia libertempo ŝi dancis en kursoj kaj ŝi eĉ entreprenis prezentadojn

kun sia salso-grupo en la Esperanto-baloj en Budapeŝto (ĝis la unua apero de la malsano en 2013).

En 2016 ŝi ne nur partoprenis en la Konferenco de ILEI en Nyíregyháza, sed instruis Esperanton al la konferencanoj. Ŝi preskaŭ ĉiam ĉeestis la Pedagogiajn Tagojn de ILEI-HU en Budapeŝto, ankaŭ la lastan en oktobro 2017, sed eĉ en aprilo 2018, grave malsana ŝi partoprenis konferencon de Faka Asocio de Lingvolernejoj (NYESZE). Pri sia malsano ŝi parolis al mi la unuan fojon en Nyíregyháza, kaj ankaŭ poste tra la reto. Sed ŝi forte luktis kaj esperis, ke ŝi resaniĝos. Kiam nia kolegino Enikő Sereghyné Zengő forpasis, Csilla kontaktis min el la hospitalo kaj skribis: „Ankaŭ min malĝojigis la forpaso de Enikő, laŭ miaj kuracistoj povas esti, ke baldaŭ mi povos ĝui ŝian ĉeeston inter la anĝeloj...”. Poste ni kune klopodis kolekti la biografiajn informojn – eluzante la periodojn, kiam ŝi fartis pli bone – por la kazo, se la malsano venkos. La adiaŭa ceremonio okazis la 4-an de julio en Budapeŝto. Kara Csilla, la malsano venkis, sed la vera heroo estas vi, ni ne forgesos vin.

Jozefo NÉMETH

Italio

Titoldono de urba placo al la iamaj membroj de ILEI Mario kaj Catina Dazzini de Massa (Italio)



En la ĉeesto de pli ol 70 personoj, la Komunumo de Massa oficiale titolis placon en la urba centro *Mario e Catina Dazzini, esperantisti*!. Nome de la Urbo salutis la skabeno Silvana Sdoga, kaj ĉeestis Stefano Neri reprezente de la Urbo Forte dei Marmi. Kantis la italan himnon dulingve la infanoj de klaso de la elementa lernejo Vallergera, kie E-on instruas Gabriella Lottini. Miaj salutvortoj dum la ceremonio:

„Bonan tagon al ĉiuj! Mi estis invitita al ĉi tiu ceremonio honore al la fratoj Mario kaj Catina Dazzini kaj mi akceptis la inviton volonte. Ĉi tiuj du

grandaj instruistoj ĉiam estis prezentataj al ni kiel ekzemploj de devontigo al junuloj kaj al ilia plenumo en la profesia vivo. Kiel rakontas la artikoloj aperintaj en la revuo *l'Esperanto* de Itala Esperanto-Federacio, la jaroj tuj post la fino de la terura dua mondmilito estis facilaj por neniuj ajn. Oni devis reorganizi la laborpostenojn de multaj civitanoj de Massa kaj en tio profesoro Dazzini estis helpata de sia granda karismo: li kapablis paroli al junuloj, li sciis kuraĝigi la kunvenojn kaj festenojn per sia muziko ĉe la fortepiano (li estis pianisto), li sukcesis enscenigi prezentadojn kaj teatrajn vesperojn, en kiuj ĉiuj civitanoj partoprenis. Sed li ne nur faris ĉion ĉi: li ankaŭ sciis rakonti ĝin. Por Mario Dazzini estis grave informi ĉiujn pri la laboro farita. Ni ankoraŭ devas lerni tion fari.

Fratino Catina emis esti en la ombro de sia frato kaj li havis tre bonan helpon de ŝi. Kiel Mario, kiu renkontis la svisan esperantiston Attinger en novembro 1931 en la Universitato de Florenco, ankaŭ Catina lernis Esperanton kiam ŝi estis tre juna. Ambaŭ estis konvinkitaj pri la eduka valoro de ĉi tiu lingvo kaj laboris favore al ĝia progreso en la socio. Por helpi instruistojn en la vasta mondo, ili membriĝis en ILEI – la Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj, kiu ekzistadas kaj aktivis favore de la kolegoj.

ILEI ĉeestas en la tuta mondo kun 40 naciaj sekcioj, kun reprezentantoj en 13 aliaj landoj kaj kontaktopersonoj en 17 ŝtatoj. ILEI formas transnacionan profesion platformon por instruistoj, kiuj parolas Esperanton. Ĝi ankaŭ celas antaŭenigi la instruadon de la lingvo Esperanto kaj en lernejoj kaj pere de la reto, trejni instruistojn, prepari ekzamenojn, publikigi modernajn lernolibrojn kaj kunvenigi kaj organizi instruistojn de Esperanto kaj iliajn studentojn.

La Ligo publikigas du revuojn: ĝia oficiala organo estas *Internacia Pegagogia Revuo* por instruistoj kun 4 numeroj jare. La alia revuo nomiĝas „*Juna Amiko*” kun 4 numeroj jare por la lernantoj de la lingvo.

ILEI havas *sciencan komitaton*, al kiu kunlaboras universitataj profesoroj de Hartford kaj Principiaa Kolegio (Usono), Barat (Hindujo), Litovio, Pollando, Italio, Nov-Zelando, Rusujo, Serbio kaj Hungario.

Ĉiun jaron, ILEI organizas konferencon, kiu inkluzivas profesiajn, praktikajn kaj sociajn aspektojn. La listo de ĵusaj konferencoj atestas la kreskantan internaciecon de la Ligo: 2006 Parma (Italio), 2007 Ranzan (Japanio), 2008 Porto Novo (Benino), 2009 Kraków (Pollando), 2010 Matanza (Kubo), 2011 Kopenhago (Danio), 2012 Kunming (Ĉinio), 2013 Herzberg (Germanio), 2014 Montevideo (Urugvajo), 2015 Oostende (Belgio), 2016 Nyíregyháza (Hungario), 2017 Busano (Koreio), 2018 Madrido (Hispanio).

La programoj de ILEI ebligas al infanoj el malsamaj landoj malkovri la kulturojn unu de la alia danke al komuna lingvo: plurdekoj da tiaj projektoj estis realigitaj kadre de la eŭropaj programoj *Comenius* kaj *Grundtvig*. Ankaŭ la *Instrua Komisiono* de Itala Esperanto-Federacio proponas al niaj lernejoj projektojn nomatajn „*Unu horo pri Esperanto por infanĝardenoj kaj antaŭlernejaj infanoj*” kaj „*Unu leciono pri Esperanto por lernejoj*”. La celo de ĉi tiuj proponoj estas fakte, ke al ĉiuj infanoj devus esti proponita la eblo ekscii, ke ekzistas rapide lernebla lingvo, kiu povas esti uzata tuj kaj kiu ebligas al ni komuniki kaj amikiĝi kun homoj tra la tuta mondo.

Mi havis la bonŝancon persone konatiĝi kun profesorino Catina Dazzini. Mi memoras ŝian grandan humanecon kaj ŝian dolĉan rideton, sed ankaŭ ŝian fortan volon neniam preterlasi la celon de la multaj kaj kelkfoje lacigaj vojaĝoj: komunikado kaj amikeco kun homoj de aliaj landoj kun malsamaj lingvoj kaj kulturoj. Kiel reprezentanto de la itala sekcio de ILEI, mi deziras ĉi tie esprimi mian profundan dankemon al Catina kaj Mario Dazzini, kiuj, per la membriĝo al ILEI, preparis por ni la vojeton, sur kiu ni povas daŭrigi nian iradon al pli envivebla mondo.”

Luigia OBERRAUCH MADELLA

Nederlando

Rob Moerbeek, honora membro de UEA, ricevis nederlandan reĝan Ordenon de Oranje-Nassau. La urbestro de la urbo en kiu Rob Moerbeek loĝas, Beverwijk, speciale venis al Roterdamo por enmanigi la ordenon kaj gratuli la samurbanon dum la Malferma Tago de UEA, la 28-an de aprilo 2018 (vidu videon: <https://www.youtube.com/watch?v=2viNCD2snwg>).

Rob Moerbeek fariĝis kavaliro de la ordeno pro siaj grandegaj meritoj por la Esperanto-movado en Nederlando kaj tutmonde, kaj ankaŭ pro sia daŭra sindediĉa agado favore al handicapitoj, precipe blinduloj kaj malfortevidantoj.

Fonto: Gazetaraj Komunikoj de UEA (N-ro 733)

Esperanto au Bac: agadraporto pri franca eksperimento

Kiel jam informite pere de la revuo ESPERANTO de oktobro 2017, „*Nova situacio nun ekzistas en Francio: la edukministerio permesas al direktoroj de lernejoj lanĉi Esperanto-instruadon*”. Fakte, sekve al nacia petskribo lanĉita en 2011 kaj al tri renkontiĝoj kun la franca ministerio pri edukado, dediĉita komisiono de Esperanto-Francio sukcesis persvadi la ministerion provi eksperimenti instruadon de nia komuna lingvo ekde la lernojaro 2017-2018.

Tial, en la ricevita letero (12-a de Aprilo 2017), post nia tria kunveno, ni estis i.a. sciigitaj ke:

„tia instruado povos okazi nur, kie estraro konsentos.”

„la ministerio pripensos disvastigi tian instruadon en la francan edukado-sistemon, kondiĉe ke ĝi arigos sufiĉajn lernantojn kaj instruistojn”.

„havi la nivelon C1, ne certigas esti pedagogie kaj didaktite kompetenta pri instruado de vivantaj lingvoj.”

Ankaŭ gravas scii, ke dum nia dua kunveno la ministerio atentigis nin, ke *„ĝenerale, esence estas konsiderataj la petoj de familioj aŭ instruistoj kaj ke pro tio vi devos venigi tiajn petojn sekve al la estigo de plej eble multe da modelaj instruadoj.”*

Alivorte, en Francio, tiun eksperimenton ĉefe rajtas sperti nia esperantista instruistaro.

Tiele, sekve al pluraj alvokoj de la komisiono de Esperanto-Francio kaj danke al ekspozicioj, inform-kunvenoj aŭ apogoj de lernejestroj, 13 geinstruistoj laborantaj aŭ emeritaj sukcesis enkonduki tiun lernadon en sian bazan lernejon, mezlernejon aŭ liceon. Entute 286 gelernantoj malkovris kaj pli-malpli eklernis Esperanton plej ofte laŭ la nova Metodo 11, Mazi, I-Kurso aŭ Lerno.

Por tiuj gratulindaj pioniroj, la aventuro pri la ĝeneraligo de la instruado de Esperanto jam ekis.

Notinde estas, ke unu el la geinstruistoj kaj ŝiaj 3 kolegoj eklernis Esperanton dum la lasta kvaronjaro 2017-a kaj tuj poste ĝin instruis al 94 lernantoj de sia lernejo. Kie estas volo, tie estas povo!

Aldone al la jenaj kelkaj ricevitaj komentoj de la geinstruistoj: „entuziasmaj gelernantoj”, „tre instigitaj”, „kelkfoje ili alvenis frue al la kursoj”, „bonega lernetoso”, „ili deziras plu lerni ĝin”, „ili deziras, ke Esperanto estu en la oficiala programo”, „la gepatroj estas plezurige surprizitaj”, la rezulto de tiu unua eksperimenta jaro estas tre kuraĝiga kaj superis nian atendon.

Tamen, post tri aŭ kvar jaroj oni povos timi, ke tiu rezulto estus tro magra en la okuloj de nia ministerio. Konsekvence, gravos senĉese plialtigi la kvantojn da gelernantoj, geinstruistoj kaj lernejoj.

Pro tio, ne nur en Francio sed ankaŭ en la mondo ni alvokas ĉiun leganton de la ĉi-tiea artikolo partopreni en la sukceso de tiu eksperimentado, aŭ kiel instruisto, aŭ kiel aktivulo proponante sian helpon al tiuj, kiuj povus instrui Esperanton en lernejoj.

Grava rememorigo al la partoprenontaj kaj la partoprenontaj geinstruistoj:
nepre bonvolu registri via(j)n kurso(j)n gvidita(j)n en la koncerna paĝo de Edukado.net:

[https://edukado.net/kursejo?montrirezulton=1&dat\[simpla\]=1&dat\[tipoj\]=1](https://edukado.net/kursejo?montrirezulton=1&dat[simpla]=1&dat[tipoj]=1)

Efektive, ĝi ja estas la sola registro de ĉiuj Esperanto-kursoj en la tuta mondo. Ju pli riĉa ĝi estos, des pli ni estos kredindaj. Plie, tio ege allogos lernantojn, lernejestrojn, instruistojn, eblas esti ĝi lerneajn internaciajn interŝanĝojn kaj, kial ne, eĉ ĝemeligojn!

Nome de la dediĉita komisiono de Esperanto-Francio.

Guy CAMY, Maurice JUY, Jesper JACOBSEN

Riparotaj/tradukotaj frazoj

de Rob MOERBEEK (Nederlando)

1. Lingvaj studoj mezuras kiongrade esperanto estas averaĝa lingvo.
2. Rigardante la paletron de lingvoj de la mondo, estas multaj malmulte uzataj lingvoj.
3. En la plimultaj kazoj ĥ estas anstataŭata per k.
4. 49% da lingvoj havas prepozicion kiu servas esprimi sintaksajn rilatojn.
5. Ekzistas hospitalo, sed samrajte ni povas uzi malsanulejon.
6. Zamenhof miselektis (mal)fermi, ĉar ofte ili estas konfuzitaj.
7. En la bona lingvo oni uzas tagordo anstataŭ agendo.
8. Esperanto estas ofte pli abstrakta ol siaj fontolingvoj.
9. Do eĉ se esperanto ne estas averaĝa lingvo, sed havas trajtojn de izola lingvo.
10. Apud predikatoj rolas agantoj kaj agatoj.
11. Laŭlitere la vorto signifas tablogambo.
12. La putraj tomatoj venis flanke de kolonistoj.
13. Se vi eniras politikon, vi aŭtomate venas en la spoton.
14. La kaŝspiono reagis malsame al ĉiuj ceteraj partoprenintoj.
15. Mi tre bedaŭras ke la Akademio ne sekvis Zamenhof kaj sisteme liveris kvin lingvan tradukon.
16. Dum preskaŭ du horoj la partoprenintoj dividiĝis en du diskutgrupoj.
17. Ĉu la supo estas provizata en la kromkuirejo aŭ servata ĉe la tabloj?
18. Per nia marŝo ni puŝis por sekuraj lernejoj trans Barato.
19. Klarigado transformos vivojn de infanoj.
20. Reprezentanto de la civila societo estis premiita por la lukto porinfana.
21. Samuel Ampzing famiĝis por la ĝusta uzo de la nederlanda lingvo.

22. Kelkaj civitanoj esperis ke la Francoj subtenu ankaŭ ilin en ilia batalo por libero, egaleco kaj frateco.
23. Tulpomanio pli ruinigis ol la bankroto de la urbo proklamita en 1492.
24. La urbo kun 15 000 da enloĝantoj bonvenigis iniciantojn de industrio.
25. Orlando provizis modelan statuon de Londona Esperanto-Asocio kaj ties Landa Asocio.
26. En ĉi tiu parko kavaliroj ĉasis damojn.
27. Li asertis, ke sur la foiro furiozis sia ĉefverko.
28. Harlema sciencsocieto celis subteni diverspecajn sciencojn.
29. Atentu drogojn pli fortikaj ol tabako.
30. Ni diskutu kion ricevos la jublanto.
31. Vi ne devus kanti tiom false, etulo!
32. Venos tamen diversaj gastoj?
33. Iu aĉetis nelge en la supermerkato praan Philishave, malilo por lia/sia barbo.
34. La ministro ridtrajtis pri la kresko en la volumo da BNP.
35. Ni estimas viajn kapacitojn, nomas vin al prezidento kaj plenrajtas vin disponi la financojn.
36. Dank'la pretrafiko ni malfruis en la oficejon. Kaj la punpagon ni povas danki al nia veturkonduo.
37. Enketo, miliono, sezono, sciencisto, radio, alia historio, apud, Ĉeĥa ŝoforo ĵetiĝis malantaŭ cugo.

Riparo de la riparotaj frazoj:

1. Lingvaj studoj mezuras kiugrade (aŭ: kiom) Esperanto estas averaĝa lingvo.
'Kiomgrade' estas same pleonasma kiel 'kielmaniere'. 'Esperanto' kun majusklo.
2. Se rigardi la palettron de lingvoj, troviĝas multaj malofte uzataj lingvoj. Absoluta partícipo ne ekzistas en Esperanto. Do eblas: Rigardante... ni trovas,,,
3. En la pli multaj okazoj 'ĥ' estas anstataŭigata per 'k'.
4. 49% de (aŭ: el) la lingvoj havas prepozicion kiu servas por esprimi...
Ĉe proporciój la determinanta tuto estas kvante difinita, Do ne uzeblas DA.
5. Ekzistas 'hospitalo', sed samrajte ni povas uzi 'malsanulejo'.
Temas pri vortoj, ne pri la fenomenoj mem: 'uzi la vorton malsanulejo'.
6. Zamenhof miselektis 'fermi' kaj 'malfermi', ĉar ofte ili estas konfuzataj.
Se temas pri kutimo aŭ aktualaĵo, ni uzas 'estas -ata'.
7. En 'la bona lingvo' ni uzas 'tagordo' anstataŭ 'agendo'.

- Temas pri naciismo, ĉar en Esperanto 'agendo' estas nur notlibreto.
8. Esperanto estas pli abstrakta ol ĝiaj fontolingvoj.
Atentu, ke 'ol' enkondukas novan frazon; 'sia' ne povas esti parto de la subjekto.
9. Eĉ se Esperanto ne estas averaĝa lingvo, ĝi tamen havas trajtojn de izola lingvo.
PAG avertas ne uzi 'sed' post 'kvankam', do same post 'eĉ se'.
10. Apud predikatoj rolas agantoj kaj suferantoj.
'Agato' estas mineralo; 'agi' ne estas transitiva'. La rekta objekto suferas la agon.
11. Laŭlitere la vorto signifas 'tablokruro'.
Ĉe 'gambo' ni imagas promenantan meblon.
12. La putraj tomatoj venis de (flanke de) koloniistoj.
Multaj paŭsas nacilingvan esprimon, forgesante ke 'flanke de' estas 'apud'.
Kolon-isto povus esti kolonsida ermito.
13. Se vi (oni) eniras politikon, vi (oni) aŭtomate venas sub la spoto(j)n.
Precipe nacilingvaj prepozicioj bezonas daŭran skeptikon: 'en la ampoleton'?
14. La kaŝspiono reagis malsame ol ĉiuj ceteraj partoprenantoj.
Simile al, sed same kiel, do malsame ol. Partoprenantoj ne plu ĉeestas.
15. Mi tre bedaŭras ke la Akademio ne sekvis la ekzemplon de Zamenhof kaj ne sisteme liveris kvinlingvan tradukon.
La ripeto de 'ne' helpas al klareco. 'Kvinlingva' unuvorte, same kiel 'interalie'.
16. Por preskaŭ du horoj la partoprenantoj dividiĝis en du grupojn.
Ili ne dividiĝadis dum du horoj.
17. Ĉu la supo estas donata en la kromkuirejo aŭ surtabligata?
Oni provizas aŭ servas iun per io. Tamen ĉe 'kelnero' PIV donas alian eblon.
18. Per nia marŝo ni 'puŝis' por sekuraj lernejoj tra Barato.
'Puŝi' verŝajne estas komprenebla kiel 'insiste pledi'. 'Trans' signifus ellandiĝon.
19. Klerigado transformos la vivon de infanoj.
Se iuj havas po unu aferon, ni uzu singularon (vivon). Mislego (Klar-) donas mirigan rezulton.
20. Reprezentanto de la civila socio estis premiita pro la lukto porinfana.
Paronimoj: socio/societo; por/pro.
21. Same: famiĝis pro...
22. Kelkaj civitanoj esperis ke la francoj subtenos ankaŭ ilin en ilia batalo...
Post 'espero' kaj 'promeso' ni uzas la futuron. Alie necesus 'deziri'.
23. Tulipomanio pli ruinigis ol la bankroto deklarita.
Nederlandismo (tulp). Oni proklamas leĝon, ne katastrofon.

24. La urbo kun 14 000 loĝantoj bonvenigis iniciatontojn de industrio.
Post ordinaraĵ numeraloj kiel 'mil' ne sekvas 'da'. Multaj mistraktas 'iniciati'.
25. Orlando disponigis modelajn statutojn de la Londona E-Asocio kaj ĝia landa asocio.
Do la statuton de la Londona E-Klubo kaj tiun de EAB. (vd 17)
26. Kavaliroj ĉasis damaojn. (cervo-'familio': cervedo)
27. Li asertis ke en la merkato furoras lia ĉefverko.
Gramatike gravas la tenso (verbotempo) en la nereкта parolo.
28. Harlema sciencosocieto celis subteni diversspecajn sciencojn.
Duobla konsonanto kiel en 'posttagmeze', ne ag-meze.
29. Atentu drogojn pli fortajn ol tabako.
Tro ofte oni forgesas la akuzativon postmetante epiteton post rekta objekto k.s.
30. Ni diskutu, kion ricevu la jubileanto.
La diskuto implicas ke ankoraŭ ne ekzistas decido/plano por la estonteco.
31. Vi devus kanti ne tiom malharmonie/fuŝe, etulo!
Falsa = ŝajnage vera. Ja ekzistas 'falseto'. 'Ne' ofte aperas nelogike antaŭ predikato, laŭ esploro de d-ro Wim Jansen.
32. Venos ja pluraj gastoj, ĉu ne?
La uzo de 'tamen' estas tro nederlanda.
33. Iu antaŭ nelonge aĉetis praan 'Philishave' (elektran razilon) en la superbazaro (supermarkto, ĉiovendejo), malhelpilon por lia barbo.
Foje necesas noto ĉe traduko pro neinternacia koncepto. Eblas dubi ĉu ni uzu 'por SIA barbo', ĉar la 'malutilaĵo' ja dependas de 'aĉeti'. Li aĉetis por sia barbo. Sed la kunteksto implicas: kiu evidentiĝis malutilaĵo. En tiaj okazoj eble preferindas trakti la frazparton kiel sendependan komenton aŭ eksklamacion: Malhelpilo por lia barbo.
34. La ministro ridmienis pri la kresko de la volumeno de la BEP.
Paronimoj: volumo (de granda verko)/volumeno. Sed rolas ankaŭ nederlanda kutimo paroli pri la Bruta Nacia - anstataŭ Enlanda – Produkto.
35. Ni alte taksas viajn kapablojn, nomumas vin kiel prezidanton kaj plenrajtigas vin disponi la financon.
Estimi ne signifas 'taksi', nur honor(et)i; kapacito rilatas enhavipovon. PIV registras nur 'nomumi' por havigo de posteno. Financo singulare sufiĉas.
36. Pro la prema trafiko ni malfruis en la oficejo. Kaj la monpunon ni eble atribuu al nia veturstilo.
Laŭmode 'dank' al' estas uzata ironie: maldank' al. Prefere 'pro'. Se ni dubas ĉu uzi la akuzativon, pli ofte eblas ĝin forlasi: en la oficejo. La ceteraj retuŝoj ne tre gravas.

37. Tiuj vortoj ofte estas misprononcataj de nederlandanoj; 'apud' ankaŭ de franclingvanoj. Eble vi trovos pli koncizan frazon por la ĉapelitaj literoj. Por nederlandanoj gravas krome 'u'; kaj 'c'.

ILEI kongresos en Serbio venontjare

La Estraro de ILEI, skajpkunside la 7an de julio, decidis: La 52-a Kongreso de ILEI okazos en Ĉaĉak, Serbio, 13-20 julio 2019, en la Fakultato de Teknikaj Sciencoj, apartenanta al la Universitato de Kragujevac. La kongresa temo interkonsentita kun la kongresgastiganto:

Lernado en virtualaj komunumoj

- apartenas al la sfero de intereso de ILEI;
- gravas por gastiganto de la kongreso - la fakultato, kiu okupiĝas interalie pri lertigado de instruistoj de teknikaj fakoj kaj pri la uzado de informteknologioj en edukado (do komuna intereso de ILEI kaj la fakultato);
- ligeblas al la Internacia jaro de indiĝenaj lingvoj 2019 (ekzemple per atento pri virtualaj lernkomunumoj de indiĝenaj popoloj, ankaŭ de esperantistoj);
- estas bona temo por universitata internacia konferenco enkadre de la ILEI-kongreso (anstataŭ la kutima ILEI-simpozio), kies kunorganizanto estos la fakultato.

Kial Serbio kaj Ĉaĉak?

- La iam tre vigla kaj nun perdinta la forton E-movado en sudorienta Eŭropo, kaj precipe en Serbio, bezonas kuraĝigan impulson.
- Serbio iom longe restas relative nekonata de esperantistoj kulture, turisme kaj gastronomie, do malkovrinda.
- Serbiaj vizoj ne estas bezonataj por turistoj el multaj landoj kaj la viza reĝimo de Serbio povas esti pli oportuna por kongresanoj el Afriko kaj sud-orienta Azio ol kiam oni vojaĝas en aliajn ŝtatojn de Eŭropo.
- Bonaj flugtransportaj ligoj kun Finnlando, por atingi la UK.

Plus bonaj kondiĉoj:

- por la kongresa programo:
 - prelegejoj kaj aŭloj de la fakultato

- studenta restoracio kaj kunvenejoj de la proksima studenthejmo
- najbaraj sportaj terenoj kaj naĝejo
- koncertejo en la *Kulturdomo* je promendistanco
- por la loĝado:
 - novkonstruitaj kaj komfortaj studenthejmo kaj loĝdomo de mezlernejanoj tuj apud la kongresejo
 - urbaj hoteloj kaj hosteloj je promendistanco
- por la *Infana universitato*:
 - proksimaj infanĝardeno kaj loĝdomo de mezlernejanoj

Antaŭ- kaj/aŭ post-kongrese

- Viziti Serbion kaj konatiĝi nur kun Ĉaĉak kaj ĝia ĉirkaŭaĵo – estus domaĝe malmulte.
- Se vi venos tri tagojn pli frue, la antaŭkongresa ekskurso videbligas kaj ĝuigos al vi multe pli: Beogradon kaj vidindaĵojn inter ĝi kaj Ĉaĉako.
- Simile postkongresa ekskurso se vi ne hastos al Lahtio por la UK.

Programkontribuoj

Viajn prelegproponojn kaj aliajn kontribuproponojn por la kongresa programo, aŭ komentojn, demandojn kaj proponojn sendu al ilei.kongresoj@gmail.com aŭ al la poŝtadreso de la estrarano pri kongresoj, trovebla sur la dua kovrilpaĝo de la revuo.



La kongresejo

Bonvenon! Aliĝilo

LA 52-a KONGRESO DE ILEI
Ĉaĉak, Serbio, 13 - 20 julio 2019

* La asterisko indikas nepre respondendajn demandojn.

S-ino/ S-ro Persona(j) nomo(j)* _____

Familia(j) nomo(j) * _____

Naskiĝdato _____ Lando* _____ Urbo _____

Loĝadreso _____

Retpoŝtadreso* _____ Kontakt-telefono _____

Ĉu vi bezonas vizon por eniri la kongreslandon?* JES / NE

Ĉu vi konsentas aperigon de via retadreso en la partoprenlisto?* JES/ NE

Aliĝkategorio*: Membro de ILEI Honora Membro de ILEI

Ne-membro Infano Junulo Handikapulo

Por 1 aŭ 2 tagoj Familiano de alia aliĝinto

Alvendato: _____ Forirdato: _____

Kotizo (EUR)*: _____ Donaco (EUR): _____ Entute (EUR)*: _____

Celo de la donaco: _____

Pagmaniero*:

(1) Tra ING-banko, (2) Tra UEA, (3) Al LKK,

Kiun lingvon vi pretas prezenti en la Lingva Festivalo? _____

Aliaj kontribuproponoj? _____

En kiuj kursoj, seminarioj, trejnado vi ŝatus partopreni? _____

Komentoj _____

Kotizkondiĉoj: Mi komprenas kaj akceptas, ke:

- Pagendas la kotizo valida por la dato de pago laŭ la kotiztabelo.
- Kaze de rezigno, 50% de la kotizo estos repagitaj se aliĝinto malanoncas sin pro valida kaŭzo antaŭ la 15-a de junio de la kongresa jaro.

Loko, dato _____ Subskribo _____

La plenigitan aliĝilon bonvolu sendi al: Radojica Petrović – por ILEI-kongreso, Bul. oslobođenja 36, RS-32000 Čačak, Serbio
 aŭ ĝian skankopion al la retadresoj:
ilei.kongresoj@gmail.com kaj ilei.kasisto@gmail.com.

Prefere uzu elektronikan aliĝilon:
<https://goo.gl/forms/TOrY5bltJtK0BKeG2>

Kotiztabelo en eŭroj (€)

Aliĝperiodo	ĝis 31.03.2019		ĝis 30.06.2019		post 30.06.2019	
	A	B	A	B	A	B
Membro de ILEI	60	35	70	40	85	50
Ne-membro	75	50	90	55	105	65
Infano ĝis 18 j.	5	5	5	5	5	5
Junulo, handik.	30	20	35	25	40	30
Familiano, akompananto	50%	50%	50%	50%	50%	50%
Por 1 aŭ 2 tagoj	30	30	35	35	40	40

* Aliĝkategorioj:

- A. Ĉiuj landoj escepte de tiuj ĉi-sekve sub B.
 B. Ekssocialismaj landoj de orienta Eŭropo; landoj de Latinameriko, Afriko, kaj Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko).

Pagmanieroj

- (1) Tra ING-banko: Al ILEI-konto ĉe ING-banko, IBAN: NL55INGB 0004676855, BIC: INGBNL2A, kun indiko: "ILEI-Kongreso 2019" plus nomo. Aldonu 5 € se vi pagas de ekster Eŭropa Unio.
- (2) Tra UEA: Al ILEI-konto ilek-a ĉe UEA, indikante "ILEI-Kongreso 2019".
- (3) ALLKK: Validas nur por aliĝantoj el Serbio

PLIAJ INFORMOJ

- Per la adresoj komence de ĉi tiu paĝo
- Kongresaj retpaĝoj de ILEI: <http://www.ilei.info/agado/konferencoj.php>
- FB-grupo ILEI-Kongresoj:
<https://www.facebook.com/groups/ILEI.Kongresoj/>

Radojica PETROVIĆ, estrarano pri kongresoj

INFORMOJ PRI ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Karine Arakelian (prez.), Mireille Grosjean (vicprez.), Christophe Chazarein, Mónika Molnár, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.

Elekta: Aurora Bute (gvid.), Zsófia Kóródy, Rob Moerbeek.

Kontrolo: Simon Smits, Orlando Raola.

Lerneja: Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.

Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill. Estrare: M. Grosjean.

Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny. Estrare: Mireille Grosjean.

Universitata: Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Goro Kimura, Ilona Koutny, Radojica Petrović, Kristin Tytgat. Estrare: Ivan Colling.

Enmovadaj partneroj (entute 14)

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, *info@ikso.net*. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>.

Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74, NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: *redaktanto@edukado.net*.

ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983, Trejnsejnoj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, *zsafia.korody@esperanto.de*.

IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio): *vd. la Jarlibron de UEA*

TEJO (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Radojica Petrović**.

Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Arina Osipova**.

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando,

www.uea.org. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Mireille Grosjean**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Stefan MacGill**.

kaj aliaj

Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

ALTE (*Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo*) Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**,

FIPLV (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*): Repr. de ILEI: **Mireille Grosjean**.

UN (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leysester Miro**.

Unesko (kun statuso de observanto): Reprzentantoj de ILEI: **Monique Arnaud** (ĉefdelegito), Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, *monique.arnaud@aliceadsl.fr*, **Jean-Pierre Boulet, Pascale Voldoire**.

kaj aliaj

Membreco kaj pagado por diversaj servoj

Membreco kostas 20 € en A-landoj (laŭ UEA-difino), **10 € en B-landoj kaj 2 € en C-landoj**, kun ricevo de 4 numeroj de *IPR* jare. Kun aliro nur al la reta versio de *IPR* membreco kostas **10 € por la A-landoj, 5 € por la B-landoj kaj 1 € por C-landoj**. Supera membro estas tiu ILEI-membro, kiu mendas paperan *IPR* kaj paperan *Juna Amiko*. Tio kostas por A-landanoj **32 EUR kaj por B-landanoj 18 EUR**. Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por *Juna amiko* akceptas abonojn enlande.

Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al Vilĉjo (Bill) HARRIS, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Bv klare indiki la celon de via pago. La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de la nederlanda ILEI-banko aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:

a) Pagoj al la nederlanda banko de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bonvolu aldoni 5 € por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo) kaj EU.

b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: Por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 24 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona paĝo. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).

* Retpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

Redakciaj informoj

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Marc CUFFEZ, *Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende*. **Teknika helpo**: Stano MARČEK. **Presado**: Alfaprint, Martin, Slovakio. **Redaktoro**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario*, jozefo.nemeth@gmail.com, www.ilei.info/ipr/; tel: (+36-70) 931-0530.

La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE BEVERWIJK, Nederlando*, <moerbeekr@gmail.com>.

**Ni fermis la nunan numeron la 15-an de aŭgusto 2018,
redaktofino por la sekva numero: la 15-an de novembro 2018.**



Alessandra Madella ricevas la Premion Mauro La Torre. Renato Corsetti transdonis ĝin, reprezentante la familion La Torre (vd. p.17)



Annie GRENTE instruas (vd. p.6)

13–20 julio 2019
52-a Kongreso de ILEI
Čačak (RS)

LERNADO EN VIRTUALAJ KOMUNUMOJ

Universitato de Kragujevac
Fakultato de Teknikaj Sciencoj
en Čačak, Serbio

